



La Knollen-turo sur monto *Großer Knollen*

La *Knollen*-turo kaj montokabano situas sur la pinto de *Großer Knollen* (687 m) – nomata ankaŭ „*Brocken* de la Sud-Harco“ (laŭ la plej alta monto en montaro *Harz*).

Großer Knollen – montokonuso inter Herzberg, Bad Lauterberg kaj Sankt Andreasberg – fariĝis unu el la plej impresaj kaj ŝatataj promenceloj. Atinginte ĝian supron, vizitantoj povas rondrigardi trans deklivojn kun densaj arbaroj kaj valojn profundajn. Kiu volas eĉ pli alten, grimpas 20 metrojn sur la *Knollen*-turon kaj spertas ravan panoramon de la *Harz*-montaro.

Multaj vojmontriloj de la *Harz*-klubo gvidas la promenanton al la gastama montokabano kun la ŝtona turo. La promenovojoj al *Großer Knollen* estas perfekte ireblaj kaj havas benkojn kaj ŝirmejojn.

La ĉarma loko kun rondrigardeblo trans la *Harz*-montaro ĝis la montoj de *Weserbergland* en okcidento promenindas en ĉiu sezono.

Priskribo de la unua supreniro sur la nove konstruitan *Knollen*-turo en la jaro 1904:

„Ĉiu, kiu faris la surgrimpon, ricevis por sia penado riĉan rekompencan. Pro sia impona alto la turo ebligas grandiozan rondrigardon. Post la ŝtupoj al la platformo oni ĝuas nekompareble belan vidon al rava montara pejzaĝo kaj vastaj ebenaĵoj. Jam antaŭe la panoramo de la Knollen-turo estis rigardata kiel unu el la plej valoraj. Nun tio eĉ pli validas, ĉar neniu elstarema arbopinto malhelpas liberan elrigardon. Tiel la impresoj estis plene kontentiga, kaj oni dankeme memoris la Harz-klubon, kiu kreis tiun bonegan verkon. Ĝuu la belegan panoramon miloj da Harz-vizitantoj!“

Pliajn informojn vi trovos je www.grosserknollen.de!



tradukis: Interkultura Centro Herzberg
Grubenhagenstr. 6
37412 Herzberg am Harz
Telefon (0 55 21) 59 83
www.esperanto-zentrum.de